


# El la Biblio, by Ludwik Lejzer Zamenhof

The Project Gutenberg eBook, El la Biblio, by Ludwik Lejzer Zamenhof

This eBook is for the use of anyone anywhere at no cost and with almost no restrictions whatsoever. You may copy it, give it away or re-use it under the terms of the Project Gutenberg License included with this eBook or online at www.gutenberg.net

Title: El la Biblio

Author: Ludwik Lejzer Zamenhof

Release Date: February 26, 2004 [eBook #11307] [File last updated on December 20, 2007]

Language: Esperanto

Character set encoding: ASCII

***START OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK EL LA BIBLIO***

Produced by Distributed Proofreaders Europe, http://dp.rastko.net Project by David Starner, Carlo Traverso and Tapio Riikonen

El la Biblio

Elektitaj cxapitroj de la Psalmaro, Sentencoj de Salomono kaj Predikanto el la originalo tradukitaj de

Dro L.L. Zamenhof

3a eldono (7a-12a miloj)

1924

---

La Psalmaro

---

## PSALMO I.

1. Felicxa estas la homo, kiu ne iras laux konsilo de malpiuloj, nek staras sur vojo de pekuloj, nek sidas en kunsido de blasfemantoj,

2. sed li nur havas deziron por la legxo de Dio, kaj pri Lia legxo li pensas tage kaj nokte.

3. Kaj li estos kiel arbo, plantita apud akvaj torentoj, donanta sian frukton en sia tempo, kaj kies folio ne velkas; kaj en cxio, kion li faras, li sukcesos.

4. Ne tiel estas la malpiuloj, sed ili estas kiel grenventumajxo, kiun disblovas la vento.

5. Tial ne staros fortike la malpiuloj cxe la jugxo kaj la pekuloj en societo de piuloj:

6. cxar Dio konas la vojon de piuloj, kaj la vojo de malpiuloj pereos.

---

## PSALMO III.

1. Psalmo de Davido, kiam li forkuris de sia filo Absalono.

2. Dio, kiel multaj estas miaj premantoj, multaj levigxis kontraux mi!

3. Multaj diras pri mia animo: ne ekzistas por gxi savo de Dio.--Sela [Hebrea muzika termino].

4. Sed Vi, Dio, estas sxildo por mi, mia honoro kaj levanto de mia kapo.

5. Per mia vocxo mi vokas al Dio, kaj Li respondas al mi de Sia sankta monto.--Sela.

6. Mi kusxigxas kaj endormigxas, kaj mi vekigxas, cxar Dio min subtenas.

7. Mi ne timas multajn milojn da homoj, kiuj estas cxirkaux mi.

8. Levigxu, Dio, helpu min, mia Sinjoro, cxar Vi frapis al cxiuj miaj malamikoj la vangojn, la dentojn de la malpiuloj Vi frakasis.

9. Cxe Dio estas la helpo; super Via popolo estas Via beno.--Sela.

---

## PSALMO XIX.

1. Al la hxorestro. Psalmo de Davido.

2. La cxieloj rakontas la gloron de Dio, kaj la farojn de Liaj manoj raportas la cxiela firmajxo.

3. Tago al tago transdonas diron, kaj nokto al nokto faras sciigon.

4. Sen parolo kaj sen vortoj; oni ne auxdas ilian vocxon.

5. Tra la tuta mondo iras ilia ordono, kaj gxis la fino de la universo iras iliaj vortoj; por la suno Li arangxis tendon inter ili.

6. Kaj gxi eliras kiel fiancxo el sia baldakeno, gxojas kiel heroo, trakuranta sian vojon.

7. Sur unu rando de la cxielo estas gxia levigxo, kaj gxia rondiro estas gxis aliaj randoj, kaj nenio kasxigxas antaux gxia varmego.

8. La instruo de Dio estas perfekta, gxojigas la animon; la atesto de Dio estas certa, gxi sagxigas sensagxulon.

9. La ordonoj de Dio estas justaj, gxojigas la koron; la ordondiro de Dio estas klara, faras lumon antaux la okuloj.

10. La instruo de Dio estas pura, restas eterne; la jugxoj de Dio estas veraj, kaj cxiuj estas justaj.

11. Ili estas pli dezirindaj, ol oro kaj ol multe da plej pura oro; ili estas pli dolcxaj, ol mielo kaj cxelaraj mielgutoj.

12. Ankaux Via sklavo instruigxis per ili; kiu ilin observas, havas grandan rekompencon.

13. Kiu scias siajn erarojn? Purigi min de eraroj kasxitaj.

14. Ankaux de intencaj eraroj detenu Vian sklavon, ke ili ne regu super mi. Tiam mi estos perfekta kaj pura de granda peko.

15. Akceptu favore la vortojn el mia busxo kaj la parolon de mia koro antaux Vi, ho Dio, mia protektanto kaj mia savanto.

---

PSALMO XXIII

1. Psalmo de Davido. Dio estas mia pasxtisto, mi mankon ne havos.

2. Sur verdaj herbejoj Li ripozigas min, apud trankvilaj akvoj Li kondukas min.

3. Li kvietigas mian animon, Li kondukas min laux vojo de la vero, pro Sia nomo.

4. Ecx kiam mi iros tra valo de mallumo, mi ne timos malbonon, cxar Vi estas kun mi; Via bastono kaj apogigxilo trankviligos min.

5. Vi kovras por mi tablon antaux miaj malamikoj; Vi grasigis per oleo mian kapon, mia pokalo estas plenigita.

6. Nur bono kaj favoro sekvos min en la dauxro de mia tuxta vivo, kaj mi restos en la domo de Dio multajn jarojn.

---

PSALMO XXIV.

1. Psalmo de Davido. Al Dio apartenas la tero kaj cxio, kio gxin plenigas, la mondo kaj cxiuj gxiaj logxantoj.

2. Cxar Li apud la maroj gxin fondis kaj apud la riveroj gxin fortikigis.

3. Kiu levigxos sur la monton de Dio, kaj kiu staros sur Lia sankta loko?

4. Tiu, kiu havas purajn manojn kaj senmakulan koron, kiu ne fordonis sian animon al malvero kaj ne jxuras trompe.

5. Li ricevos benon de Dio kaj bonfarojn de la Plejalta, lia savanto.

6. Tio estas la gento de Liaj adorantoj, de la sercxantoj de Via vizagxo, Dio de Jakobo.--Sela.

7. Levu, pordegoj*, viajn kapojn, kaj levigxu, pordoj de la mondo, por ke eniru la regxo de gloro.

8. Kiu estas tiu regxo de gloro? Dio la forta kaj potenca, Dio la potenculo de milito.

9. Levu, pordegoj viajn kapojn, kaj levigxu, pordoj de la mondo, por ke eniru la regxo de gloro.

10. Kiu estas tiu regxo de gloro? Dio Cebaot, Li estas la regxo de gloro.--Sela.

---

PSALMO XXVII.

1. De Davido. Dio estas mia lumo kaj mia savo; kiun mi devas timi? Dio estas la forto de mia vivo; kiu povas min teruri?

2. Kiam alproksimigxos al mi malbonfarantoj, por mangxi mian karnon, miaj kontrauxuloj kaj malamikoj,--ili surpusxigxos kaj falos.

3. Se elpasxos kontraux min armeo, mia koro ne ektimos; se levigxos kontraux min milito, ankaux tiam mi havos fidon.

4. Nur unu aferon mi petas de Dio, nur tion mi deziras, ke mi restu en la domo de Dio en la dauxro de mia tuta vivo, por rigardi la cxarmon de Dio, admiri Lian templon.

5. Cxar Li kovros min en Sia kabano en la tago de malbono, Li kasxos min en kasxita loko de Sia tendo, sur rokon Li levos min.

6. Kaj nun levigxos mia kapo super miajn malamikojn, kiuj min cxirkauxas, kaj mi oferfaros en Lia tendo oferojn de danko, mi kantos kaj gloros Dion.

7. Auxskultu, ho Dio, mian vocxon, kiam mi vokas, korfavoru min kaj respondu al mi.

8. De Vi diras al mi mia koro: sercxu mian vizagxon; Vian vizagxon, ho Dio, mi sercxas.

9. Ne kasxu Vian vizagxon antaux mi, ne forpusxu en kolero Vian sklavon; Vi estis mia helpo, ne forpusxu kaj ne forlasu min, Dio, mia savo.

10. Cxar mia patro kaj mia patrino min forlasis, sed Dio min akceptis.

11. Instruu al mi, Dio, Vian vojon kaj konduku min sur gxusta irejo, spite miajn malamikojn.

12. Ne fordonu min al la volo de miaj premantoj, cxar starigxis kontraux mi falsaj atestantoj, plenaj de rabemeco,

13. ke mi ne esperu vidi la bonecon de Dio en la lando de vivantoj.

14. Esperu al Dio, tenu vin forte, forta estu via koro, kaj esperu al Dio.

---

PSALMO XXXII.

1. Instruo de Davido. Felicxa estas tiu, kies krimo estas pardonita, kies peko estas kovrita.

2. Felicxa estas la homo, al kiu Dio ne kalkulas lian kulpon kaj en kies spirito estas nenia malvero.

3. Kiam mi silentis, senfortigxis miaj ostoj de mia cxiutaga ploregado.

4. Cxar tage kaj nokte pezis sur mi Via mano; la fresxecon de miaj sukoj anstatauxis sekeco de somero.--Sela.

5. Mian pekon mi konfesis al Vi, kaj mian kulpon mi ne kasxis; mi diris: mi konfesos miajn krimojn al Dio; kaj Vi deprenis la kulpon de mia peko.--Sela.

6. Pro tio pregxu antaux Vi cxiu piulo en la gxusta tempo, por ke cxe la disversxigxo de grandaj akvoj ili lin ne atingu.

7. Vi estas mia sxirmo; kontraux sufero Vi min gardos, per gxojoj de savo Vi min cxirkauxos.--Sela.

8. Mi prudentigos vin kaj montros al vi la vojon, kiun vi devas iri; kun konsiloj mi direktos sur vin mian okulon.

9. Ne estu kiel cxevalo, kiel senprudenta mulo, al kiuj oni devas kateni la bufon per brido kaj busxpeco, kiam ili ne iras al vi.

10. Multajn frapojn havas la malpiulo, sed kiu fidas Dion, tiun cxirkauxas favoro.

11. Gxoju pro Dio, kaj gaju, justuloj, kaj triumfu cxiuj, kiuj havas pian koron!

---

PSALMO XXXIV.

1. De Davido, kiam li sxajnigis sin freneza antaux Abimelehx, kaj tiu lin forpelis kaj li foriris.

2. Mi gloros Dion en cxiu tempo, cxiam lauxdo por Li estos en mia busxo.

3. Per Dio glorigxas mia animo; la humiluloj auxdu kaj gxoju.

4. Gloru Dion kun mi, kaj ni altigu kune Lian nomon.

5. Mi sercxis Dion, kaj Li respondis al mi, kaj de cxiuj miaj dangxeroj Li savis min.

6. Kiuj rigardas al Li ricevas lumon, kaj ilia vizagxo ne kovrigxos per honto.

7. Jen tiu cxi mizerulo vokis, kaj Dio auxdis, kaj de cxiuj liaj mizeroj Li savis lin.

8. Angxelo de Dio postenas cxirkaux tiuj, kiuj Lin timas, kaj li ilin savas.

9. Provu kaj vidu, kiel bona estas Dio; felicxa estas la homo, kiu Lin fidas.

10. Timu Dion, Liaj sanktuloj, cxar nenio mankas al tiuj, kiuj Lin timas.

11. Leonoj estas senhavaj kaj malsataj, sed kiuj sercxas Dion, havas mankon en nenia bono.

12. Venu, infanoj, auxskultu min, pri timo antaux Dio mi vin instruos.

13. Kiu ajn vi estas, homo, kiu deziras vivon kaj amas multajn kaj bonajn tagojn,

14. gardu vian langon kontraux malbono kaj vian busxon kontraux mensoga parolo;

15. deklinigxu de malbono kaj faru bonon, sercxu pacon kaj cxasu gxin.

16. La okuloj de Dio estas turnitaj al la piuloj, kaj Liaj oreloj al iliaj krioj.

17. La vizagxo de Dio estas kontraux tiuj, kiuj faras malbonon, por ekstermi de la tero la memoron pri ili.

18. Tiuj krias, kaj Dio auxdas kaj de cxiuj iliaj mizeroj Li ilin savas.

19. Proksima estas Dio al tiuj, kies koro estas rompita, kaj la spirite suferantajn Li helpas.

20. Multaj estas la suferoj de piulo, sed de cxiuj Dio lin savas.

21. Li gardas cxiujn liajn ostojn, ecx unu el ili ne rompigxos.

22. La malbonulon mortigos la malbono, kaj la malamantoj de piulo pereos.

23. Dio liberigas la animon de Siaj sklavoj, kaj ne pereos cxiuj, kiuj Lin fidas.

---

PSALMO XXXVII.

1. De Davido. Ne incitigxu pro la malvirtuloj, ne enviu tiujn, kiuj agas maljuste.

2. Cxar simile al herbo ili rapide dehakigxas, kaj kiel verda vegetajxo ili forvelkas.

3. Fidu Dion kaj faru bonon; logxu sur la tero kaj konservu honestecon.

4. Sercxu plezuron cxe Dio, kaj Li plenumos la dezirojn de via koro.

5. Transdonu al Dio vian vojon kaj fidu Lin, kaj Li faros.

6. Kaj Li aperigos vian pravec*on kiel lumon kaj vian justecon kiel tagmezon.

7. Silentu antaux Dio kaj esperu al Li; ne incitigxu, kiam sukcesas homo, kiu plenumas malbonajn intencojn.

8. Detenu vin de kolero kaj forlasu furiozon, ne incitigxu, ke vi ne faru malbonon.

9. Cxar malbonfarantoj ekstermigxos, kaj la esperantaj al Dio heredos la teron.

10. Ankoraux malmulte da tempo pasos, kaj la malpiulo plu ne ekzistos,--vi rigardos lian lokon, kaj li ne estos.

11. Kaj la humiluloj heredos la teron kaj gxuos grandan pacon.

12. Malvirtulo malbonintencas kontraux virtulo kaj frapas kontraux li per siaj dentoj.

13. Sed Dio ridas pri li, cxar Li vidas, ke venas lia tago.

14. Glavon nudigas la malvirtuloj kaj strecxas sian pafarkon, por faligi mizerulon kaj malricxulon, kaj bucxi virtulon.

15. Ilia glavo trafos en ilian koron, kaj iliaj pafarkoj rompigxos.

16. Pli bona estas la malmulto, kiun havas virtulo, ol la granda havo de multaj malpiuloj.

17. Cxar la brakoj de malpiuloj rompigxas, sed la virtulojn Dio subtenas.

18. Dio scias la tagojn de la virtuloj, kaj ilia havo restos eterne.

19. Ili ne estos hontigitaj en tempo malbona, kaj en tagoj de malsato ili estos sataj.

20. Sed la malvirtuloj pereos, kaj la malamikoj de Dio malaperos kiel roso de la herbejoj, malaperos kiel fumo.

21. Malpiulo prunteprenas kaj ne pagas, sed piulo korfavoras kaj donas.

22. Cxar Liaj benitoj heredos la teron, kaj Liaj malbenitoj ekstermigxos.

23. De Dio fortikigxas la pasxoj de virta homo, kaj lia vojo placxas al Li.

24. Falante, li ne estos forjxetita, cxar Dio subtenos lian manon.

25. Mi estis juna, kaj mi maljunigxis, kaj mi ne vidis virtulon forlasita kaj liajn infanojn petantaj panon.

26. Cxiutage li korfavoras kaj pruntedonas, kaj liaj infanoj estos benitaj.

27. Forturnigxu de malbono kaj faru bonon, kaj vi vivos eterne.

28. Cxar Dio amas justecon kaj ne forlasas Siajn fidelulojn; cxiam ili estos gardataj; sed la semo de la malpiuloj estos ekstermita.

29. La virtuloj heredos la teron kaj logxos sur gxi eterne.

30. La busxo de virtulo parolas sagxon, kaj lia lango diras justecon.

31. La ordonoj de lia Dio estas en lia koro, liaj pasxoj ne sxanceligxas.

32. Subrigardas malvirtulo virtulon kaj celas mortigi lin.

33. Sed Dio ne lasos lin en liaj manoj kaj ne kondamnos lin, kiam li estos jugxata.

34. Esperu al Dio kaj tenu vin je Lia vojo, kaj Li altigos vin, ke vi heredu la teron; vi vidos la ekstermon de la malvirtuloj.

35. Mi vidis malpiulon, kiu estis spitema kaj tenis sin largxe, kiel sukplena multebrancxa arbo;

36. sed apenaux oni pasis, li jam ne ekzistis; kaj mi sercxis lin, kaj li jam ne estis trovebla.

37. Konservu senkulpecon kaj celu veron, cxar estontecon havas homo pacema;

38. sed la krimuloj cxiuj estos ekstermitaj, la estonteco de la malpiuloj pereos.

39. La virtuloj havas helpon de Dio; Li estas ilia forto en tempo de mizero.

40. Kaj Li ilin helpos kaj savos, Li savos ilin de malbonuloj kaj helpos ilin, cxar ili fidas Lin.

---

PSALMO XL.

1. Al la hxorestro. Psalmo de Davido.

2. Mi esperis, mi esperis al Dio, kaj Li klinigxis al mi kaj auxskultis mian krion.

3. Kaj Li eltiris min el la pereiga foso, el la sxlima marcxo, kaj Li starigis sur roko mian piedon kaj fortikigis miajn pasxojn.

4. Kaj Li metis en mian busxon novan kanton, lauxdon al nia Dio. Multaj tion vidos kaj ektimos, kaj ili esperos al Dio.

5. Felicxa estas la homo, kiu metis sian esperon sur Dion kaj ne turnis sin al la fieruloj kaj al la mensogemuloj.

6. Multon Vi faris, Eternulo, mia Dio! Viaj mirakloj kaj pensoj estas pri ni. Neniu egalas Vin. Mi rakontos kaj parolos, sed ili estas super cxiu kalkulo.

7. Oferojn kaj donacojn Vi ne deziras; la orelojn Vi malfermis al mi; bruloferojn kaj pekoferojn Vi ne postulas.

8. Tiam mi diris: jen mi venas; en la libro estas skribite pri mi.

9. Plenumi Vian volon, mia Dio mi deziras, kaj Viaj ordonoj estas en mia koro.

10. Mi predikas justecon en granda kunveno; jen mi ne fermas mian busxon, Dio, Vi tion scias.

11. Vian justecon mi ne kasxis en mia koro, pri Via fideleco kaj Via helpo mi parolis, mi ne kasxis Vian favorkorecon kaj Vian verecon antaux la granda kunveno.

12. Vi, Dio, ne fermu Vian favorkorecon antaux mi, Via boneco kaj Via vereco cxiam min gardu.

13. Cxar cxirkauxis min suferoj sennombraj, atingis min miaj kulpoj, ke mi ne povas vidi; ili estas pli multenombraj, ol la haroj sur mia kapo, kaj mia koro min forlasis.

14. Volu, ho Dio, savi min; Dio, rapidu helpi min.

15. Estu hontigitaj kaj malhonoritaj cxiuj, kiuj volas pereigi mian animon; retirigxu returne kaj kovrigxu per honto miaj malbondezirantoj.

16. Teruritaj estu de sia honto tiuj, kiuj diras al mi: jen vi havas!

17. Gaju kaj gxoju pro Vi cxiuj Viaj sercxantoj; la amantoj de Via helpo dlru cxiam: granda estas Dio.

18. Kaj mi estas mizera kaj malricxa; Dio pensu pri mi. Vi estas mia helpo kaj mia savanto; mia Dio, ne malrapidu.

---

PSALMO XLII.

1. Al la hxorestro. Instruo de la Korahxidoj.

2. Kiel cervo sopiras al fluanta akvo, tiel mia animo sopiras al Vi, ho Dio.

3. Mia animo soifas Dion, la vivantan Dion; kiam mi venos kaj aperos antaux la vizagxo de Dio?

4. Miaj larmoj larigxis mia pano tage kaj nokte, cxar oni diras al mi cxiutage: kie estas via Dio?

5. Elversxigxas mia animo, kiam mi rememoras, kiel mi iradis inter granda amaso, eniradis kun gxi en la dornon de Dio cxe lauxta kantado kaj glorado de festanta amaso.

6. Kial vi malgxojas, mia animo, kaj konsternigxas en mi? Esperu al Dio, cxar ankoraux mi dankos Lin por helpo, veninta de Lia vizagxo.

7. Mia Dio, malgxojas en mi mia animo, tial mi rememoras pri Vi en la lando de Jordano kaj Hermono, sur la monto Micaro.

8. Abismo resonas al abismo per la bruo de Viaj falakvoj; cxiuj Viaj akvoj kaj ondoj pasis super mi.

9. En la tago Dio aperigas al mi Sian bonecon, kaj en la nokto mi havas kanton al Li, pregxon al la Dio de mia vivo.

10. Mi diras al Dio, mia roko: kial Vi min forgesis? kial mi iradas malgaja pro la premado de mia malamiko?

11. Kvazaux trancxante miajn ostojn, mokas min miaj malamikoj, dirante al mi cxiutage: kie estas via Dio?

12. Kial vi malgxojas, mia animo, kial vi konsternigxas en mi? Esperu al Dio, cxar ankoraux mi dankos Lin, la savanton de mia vizagxo kaj mian Dion.

---

PSALMO LI.

1. Al la hxorestro. Psalmo de Davido,

2. kiam venis al li la profeto Natan post lia aligxo al Bat-Seba.

3. Korfavoru min, Dio, laux Via boneco; laux Via granda kompatemeco elstreku miajn pekojn.

4. Lavu min tute pure de mia krimo, kaj purigu min de mia peko.

5. Cxar miajn kulpojn mi konscias, kaj mia peko estas cxiam antaux mi.

6. Antaux Vi sola mi pekis, kaj mi faris tion, kio estas malbona antaux Viaj okuloj, tial Vi estas justa en Via vorto kaj pura en Via jusxo.

7. Mi estas ja naskita en krimo, kaj en peko gravedigxis per mi mia patrino.

8. Vi amas ja veron en la koro, kaj en kasxiteco Vi aperigas al mi sagxon.

9. Senpekigu min per hisopo, kaj mi farigxos pura; lavu min, kaj ml estos pli blanka ol negxo.

10. Auxdigu al mi gxojon, kaj regajigxos la ostoj, kiujn Vi batis.

11. Kasxu Vian vizagxon de miaj pekoj kaj cxiujn miajn krimojn elstreku.

12. Koron puran kreu al mi, Dio, kaj spiriton gxustan novigu en mi.

13. Ne forpusxu min de Via vizagxo, kaj Vian sanktan spiriton ne forprenu de mi.

14. Redonu al mi la gxojon de Via helpo, kaj spirito bonfara fortikigu min.

15. Mi instruos al la krimuloj Vian vojon, kaj pekuloj revenos al Vi.

16. Liberigu min de sango, Dio, Dio de mia savo, mia lango kantos Vian justecon.

17. Dio, malfermu miajn lipojn, kaj mia busxo rakontos Vian gloron.

18. Cxar Vi ne deziras oferdonon,--mi gxin donus; brulofero ne placxas al Vi.

19. Oferdonoj al Dio estas spirito suferanta; koron suferantan kaj humilan Vi, Dio, ne malsxatas.

20. Bonfaru al Ciono laux Via favoro, konstruu la murojn de Jeruzalemo;

21. tiam placxos al Vi oferdonoj de pieco, brulofero kaj plenofero; tiam oni metos sur Vian altaron junajn bovojn.

---

PSALMO LXI.

1. Al la hxorestro. Por korda instrumento. De Davido.

2. Auxskultu, ho Dio, mian krion, atentu mian pregxon.

3. De la fino de la tero mi vokas al Vi en la malgxojo de mia koro: sur rokon tro altan por mi suprenkonduku min.

4. Cxar Vi estis mia rifugxejo, fortika turo kontraux malamiko.

5. Lasu min logxi eterne en Via tendo, havi rifugxon sub la kovro de Viai flugiloj.--Sela.

6. Cxar Vi, ho Dio, auxdis miajn promesojn. Vi donis al mi la heredon de tiuj, kiuj timas Vian nomon.

7. Aldonu tagojn al la tagoj de la regxo, ke liaj jaroj dauxru multajn generaciojn.

8. Li restu eterne antaux Dio, boneco kaj vero laux Via volo lin gardu.

9. Tiel mi prikantos Vian nomon eterne, plenumante miajn promesojn cxiutage.

---

PSALMO XC.

1. Pregxo de Moseo, homo de Dio. Mia Sinjoro, Vi estis por ni rifugxejo de generacio al generacio.

2. Antaux ol la montoj naskigxis kaj Vi kreis la teron kaj la mondon, kaj de eterne gxis eterne, Vi estas Dio.

3. Vi venigis homon al morto, kaj Vi diras: "revenu, homidoj."

4. Cxar mil jaroj estas en Viaj okuloj kiel la hierauxa tago, kiu pasis, kaj kiel nokta gardoparto.

5. Vi forfluigas ilin torente, ili estas kiel songxo; matene ili renovigxas kiel herbo:

6. matene gxi floras kaj estas fresxa, vespere gxi dehakigxas kaj sekigxas.

7. Jes, ni pereas de Via kolero, kaj de Via kolerego ni neniigxas.

8. Vi metis niajn malbonagojn antaux Vin, nian kasxitajxon antaux la lumon de Via vizagxo.

9. Cxar cxiuj niaj tagoj pasis sub Via kolero, malaperis niaj jaroj, kiel sono.

10. La dauxro de nia vivo estas sepdek jaroj kaj cxe forteco okdek jaroj; kaj ilia tuta majesto estas penado kaj suferado, cxar gxi forkuras rapide kaj ni forflugas.

11. Kiu scias la forton de Via kolero, Vian terurecon kaj Vian indignon?

12. Instruu nin kalkuli niajn tagojn, por ke ni akiru sagxan koron.

13. Returnu Vin, ho Dio! Kiel longe? kaj kompatu Viajn Sklavojn.

14. Satigu nin matene per Via boneco, kaj ni kantos kaj gxojos en la dauxro de nia tuta vivo.

15. Gxojigu nin tiel longe, kiel Vi nin premis, tiom da jaroj, kiom ni vidis mizeron.

16. Al Viaj sklavoj aperu Viaj faroj, kaj Via beleco--al iliaj infanoj.

17. Kaj la favoro de la Sinjoro, nia Dio, estu super ni, kaj la faron de niaj manoj fortikigu al ni kaj fortikigu la faron de niaj manoj.

---

PSALMO XCI.

1. Kiu logxas sub la sxirmo de la Plejalta, tiu ripozas en la ombro de la Plejpotenca.

2. Mi diras al Dio: "mia rifugxejo kaj mia fortikajxo estas Dio, kiun mi fidas."

3. Cxar Li savos vin de la reto de kaptisto, de la pereiga pesto.

4. Per Siaj plumoj Li sxirmos vin, kaj sub Liaj flugiloj vi rifugxos; Lia fideleco estas sxildo kaj kiraso.

5. Ne timu la teruron de nokto, nek sagon, kiu flugas tage,

6. nek peston, kiu iras en mallumo, nek epidemion, kiu ekstermas tagmeze.

7. Cxe via flanko falos milo, kaj dekmiloj cxe via dekstra flanko, sed vin gxi ne tusxos.

8. Vi nur rigardos per viaj okuloj, kaj vi vidos la redonon al la malvirtuloj.

9. Cxar Vi, ho Dio, estas mia defendo. La Plejaltan vi elektis kiel vian rifugxejon.

10. Ne trafos vin malbono, kaj frapo ne atingos vian tendon.

11. Cxar al Siaj angxeloj Li ordonis pri vi, ke ili vin gardu sur cxiuj viaj vojoj.

12. Sur la manoj ili vin portos, por ke vi ne falpusxigxu sur sxtono per via piedo.

13. Sur leopardon kaj vipuron vi pasxos, vi piedpremos leonon kaj drakon.

14. Cxar li ekamis Min, tial Mi lin savos; Mi defendos lin, cxar li konas Mian nomon.

15. Li vokos Min, kaj Mi lin auxskultos; kun li Mi estos en mizero; Mi lin liberigos kaj honoratigos.

16. Mi satigos lin per longa vivo kaj aperigos al li Mian helpon.

---

PSALMO XCVI.

1. Kantu al Dio novan kanton, kantu al Dio la tuta tero.

2. Kantu al Dio, gloru Lian nomon, proklamu de tago al tago Lian savon.

3. Rakontu inter la popoloj Lian gloron inter cxiuj gentoj Liajn miraklojn.

4. Cxar Dio estas granda kaj tre glorinda, Li estas terura por cxiuj dioj.

5. Cxar cxiuj dioj de la popoloj estas idoloj, sed Dio kreis la cxielon.

6. Gloro kaj majesto estas antaux Li, forto kaj beleco estas en Lia sanktejo.

7. Tributu al Dio, familioj de la popoloj; tributu al Dio gloron kaj potencon.

8. Tributu al Dio honoron de Lia nomo, alportu donacon kaj venu en Liajn kortojn.

9. Klinigxu al Dio en sankta respekto; tremu antaux Li la tuta tero.

10. Diru inter la popoloi: Dio regxas, kaj Li fortikigis la mondon, ke gxi ne sxanceligxu; Li jugxas la popolojn en justeco.

11. Gxoju la cxielo kaj estu gaja la tero, bruu la maro kaj cxio, kio gxin plenigas.

12. Gxoju la kampo ka] cxio, kio estas sur gxi; tiam kantu cxiuj arboj de la arbaro.

13. antaux Dio, cxar Li venas, cxar Li venas, por jugxi la teron; Li jugxos la mondon kun justeco kaj la popolojn kun Sia fideleco.

---

PSALMO XCIX.

1. Dio regxas: tremas la popoloj; Li sidas sur keruboj, sxanceligxas la tero.

2. Dio estas granda en Ciono, kaj Li estas alte super cxiuj popoloj.

3. Oni gloru Vian grandan kaj timindan nomon: Li estas sankta.

4. Kaj la forton de la regxo, kiu amas justecon, Vi fortikigis en praveco; jugxon kaj justecon en Jakobo Vi aransxis.

5. Altigu la Eternulon, nian Dion, kaj klinigxu antaux la benketo de Liaj piedoj; Li estas sankta.

6. Moseo kaj Aarono estas inter Liaj pastroj, kaj Samuelo estas inter tiuj, kiuj vokas Lian nomon; ili vokis al Dio, kaj Li ilin auxskultis.

7. El nuba kolono Li parolis al ili; ili observis Liajn regulojn kaj la legxon, kiun Li donis al ili.

8. Eternulo, nia Dio, Vi ilin auxskultis; Vi estis por ili Dio pardonanta kaj vengxanto por iliaj faroj.

9. Altigu la Eternulon, nian Dion, kaj klinigxu antaux Lia sankta monto; cxar sankta estas la Eternulo, nia Dio.

---

PSALMO CIII.

1. De Davido. Benu, mia animo, Dion kaj mia tuta internajxo Lian sanktan nomon.

2. Benu, mia animo, Dion kaj ne forgesu cxiujn Liajn bonfarojn.

3. Li pardonas cxiujn viajn pekojn,--Li sanigas cxiujn viajn malsanojn;

4. Li savas de la tombo vian vivon, Li kronas vin per boneco kaj favorkoreco;

5. Li satigas per bonajxoj la tempon de via vivo, ke via juneco renovigxas kiel cxe aglo.

6. Dio faras justecon kaj jugxon al cxiuj prematoj.

7. Li sciigis Siajn vojojn al Moseo, Siajn farojn al la Izraelidoj.

8. Favorkofa kaj kompatema estas Dio, longetolerema kaj tre bona.

9. Ne eterne Li indignas, kaj ne por cxiam Li koleras.

10. Ne laux niaj pekoj Li agis kun ni, kaj ne laux niaj krimoi Li redonis al ni.

11. Cxar kiel alte estas la cxielo super la tero, tiel granda estas Lia boneco por tiuj, kiuj Lin timas.

12. Kiel malproksime estas la oriento de la okcidento, tiel Li malproksimigis de ni niajn pekojn.

13. Kiel patro korfavoras filojn, tiel Dio korfavoris tiujn, kiuj Lin timas.

14. Cxar Li scias nian esencon, Li memoras, ke ni estas polvo.

15. La tagoj de homo estas kiel herbo; kiel floro de kampo, tiel li floras.

16. Pasos super gxi vento, kaj gxi jam ne ekzistas, kaj gxia loko gxin jam ne rekonas.

17. Sed la boneco de Dio dauxras eterne al tiuj, kiuj Lin timas, kaj Lia bonfaremeco iras gxis la pranepoj,

18. kiuj observas Lian interligon kaj memoras Liajn ordonojn por ilin plenumi.

19. Dio en la cxielo starigis Sian tronon, kaj Lia regxeco regas cxion.

20. Benu Dion Liaj angxeloj, potencaj per sia forto, kiuj plenumas Lian vorton, por ke oni obeu la vocxon de Lia vorto.

21. Benu Dion cxiuj Liaj cxirkauxantoj, Liaj servantoj, kiuj plenumas Lian volon.

22. Benu Dion cxiuj Liaj kreitajxoj en cxiuj lokoj de Lia regado. Benu, mia animo, Dion.

---

PSALMO CXVI.

1. Mi gxojas, ke Dio auxdas mian vocxon, mian petegon,

2. ke Li klinis Sian orelon al mi, kaj en miaj tagoj mi vokos.

3. Cirkauxis min mortaj malsanoj, kaj inferaj turmentoj min trafis; suferon kaj cxagrenon mi trovis.

4. Sed la nomon de Dio mi vokis: ho, Dio, savu mian animon.

5. Favorkora estas Dio kaj justa, kaj nia Dio estas kompatema.

6. Dio gardas la simplanimulojn; mi estas en mizero, kaj Li min savas.

7. Revenu, mia animo, al via trankvileco, cxar Dio faras al vi bonon.

8. Cxar Vi savis mian animon de la morto, mian piedon de falpusxigxo.

9. Mi irados antaux Dio en la lando de la vivo.

10. Kun kredo mi diris: mi estas tre mizera.

11. Mi diris en mia konfuzigxo: cxiu homo mensogas.

12. Kion mi redonos al Dio por cxiuj Liaj bonfaroj al mi?

13. Mi levos la pokalon de savo, kaj mi vokos la nomon de Dio.

14. Miajn promesojn al Dio mi plenumos antaux Lia tuta popolo.

15. Grandvalora en la okuloj de Dio estas la morto de Liaj fideluloj.

16. Ho Dio, mi estas Via sklavo, mi estas Via sklavo, filo de Via sklavino; Vi disigis miajn ligilojn.

17. Al Vi mi oferdonos dankan oferon, kaj la nomon de Dio mi vokos.

18. Miajn promesojn al Dio mi plenumos antaux Lia tuta popolo,

19. en la kortoj de la domo de Dio, interne de vi, Jeruzalemo. Haleluja.

---

PSALMO CXXI.

1. Kanto de suprenirado. Mi levas miajn okulojn al la montoj, de kie venas al mi helpo.

2. Mia helpo venas de Dio, kiu kreis la cxielon kaj la teron.

3. Li ne lasos vian piedon falpusxigi; via gardanto ne dormetas.

4. Jen ne dormetas kaj ne dormas la gardanto de Izraelo.

5. Dio estas via gardanto, Dio estas via ombro cxe via dekstra mano.

6. En la tago la suno vin ne frapos, nek la luno en la nokto.

7. Dio vin gardos de cxia malbono, gardos vian animon.

8. Dio gardos vian eliron kaj eniron de nun kaj eterne.

---

PSALMO CXXXVII.

1. Apud la riveroj de Babilono ni sidis kaj ploris, rememorante Cionon.

2. Sur la salikoj tie ni pendigis niajn harpojn.

3. Cxar tie niaj kaptintoj postulis de ni kantojn, kaj niaj mokantoj gxojon: "kantu al ni el la kantoj de Ciono".

4. Kiel ni kantos la kanton de Dio sur fremda tero?

5. Se mi forgesos vin, Jeruzalemo, tiam forgesigxu mia dekstra mano;

6. algluigxu mia lango al mia palato, se mi vin ne memoros, se mi ne levos Jeruzalemon en la supron de miaj gxojoj.

7. Rememorigu, ho Dio, al la filoj de Edomo la tagon de Jeruzalemo, kiam ili diris: "detruu, detruu gxis gxia fundamento."

8. Ho raboplena filino de Babilono! bone estos al tiu, kiu repagos al vi por la faro, kiun vi faris al ni.

9. Bone estos al tiu, kiu prenos kaj frakasos viajn infanetojn sur sxtono.

---

PSALMO CXXXIX.

1. Al la hxorestro. Psalmo de Davido. Dio, Vi min esploras kaj min konas.

2. Vi scias, kiam mi sidas kaj kiam mi levigxas; Vi komprenas mian penson de malproksime.

3. Kiam mi iras kaj kiam mi ripozas, Vi estas cxirkaux mi, kaj cxiujn miajn vojojn Vi konas.

4. Cxar ne trovigxas ankoraux vorto sur mia lango, kaj Vi, ho Dio, cxion jam scias.

5. De malantauxe kaj de antauxe Vi cxirkaubaris min kaj metis sur min Vian manon.

6. Mirinda estas por mi tia sciado, tro alta, mi gxin ne povas kompreni.

7. Kien mi iros for de Via spirito, kaj kien mi kuros for de Via vizagxo?

8. Se mi levigxos al la cxielo, Vi estas tie; se mi kusxigxos en abismo, jen Vi tie estas.

9. Cxu mi okupos la flugilojn de la matenrugxo, cxu mi logxigxos sur la rando de la maro,

10. ankaux tie Via mano min kondukos kaj Via dekstra mano min tenos.

11. Se mi diros: mallumo min kasxos,--la nokto farigxos lumo cxirkaux mi.

12. Ecx mallumo ne mallumas antaux Vi, kaj la nokto lumas kiel tago; mallumo farigxas kiel lumo.

13. Cxar Vi kreis mian internajxon, formis min en la ventro de mia patrino.

14. Mi gloras Vin, cxar mi estas mirinde kreita; mirinda estas Viaj kreitajxoj, kaj mia animo tion bone konscias.

15. Ne estis kasxitaj antaux Vi miajx ostoj, kiam mi estis kreata en kasxiteco, kiam mi estis formata en la profundo de la tero.

16. Mian embrion vidis Viaj okuloj, kaj en Via libro estis enskribitaj cxiuj tagoj kreotaj, kiam ankoraux ecx unu ne ekzistis.

17. Kiel grandvaloraj estas por mi Viaj pensoj, ho Dio, kiel granda estas ilia nombro!

18. Se mi ilin kalkulus, ili estus pli multaj ol la sablo; kiam mi vekigxas, mi estas ankoraux kun Vi.

19. Mortigu, ho Dio, la malvirtulon, kaj sangaviduloj forigxu de mi!

20. Ili parolas pri Vi malice kaj Viaj malamikoj levigxas por trompo.

21. Viajn malamantojn, ho Dio, mi ja malamas, kaj Viajn kontrauxulojn mi abomenas.

22. Por ekstrema malamo mi ilin malamas; ili farigxis por mi malamikoj.

23. Esploru min, Dio, kaj konu mian koron; provu min kaj sciu miajn pensojn.

24. Kaj rigardu, cxu mi estas sur malbona vojo, kaj gvidu min sur la vojo de eterneco.

---

PSALMO CXLVI.

1. Haleluja. Gloru, mia animo, Dion.

2. Mi gloros Dion en la dauxro de mia tuta vivo, mi kantos al Li tiel longe, kiel mi estos.

3. Ne fidu eminentulojn, homidon, kiu ne povas helpi.

4. Eliras lia spirito, li reiras en sian teron, kaj en tiu tago neniigxas cxiuj liaj intencoj.

5. Bone estas al tiu, kies helpo estas la Dio de Jakobo, kiu esperas al la Eternulo, lia Dio,

6. kiu kreis la cxielon kaj la teron, la maron kaj cxion, kio estas en ili, kiu gardas la veron eterne;

7. kiu faras justecon al la maljuste suferantaj, donas panon al la malsataj. Dio liberigas la malliberulojn;

8. Dio malfermas la okulojn al la blinduloj; Dio restarigas la kurbigitojn; Dlo amas la virtulojn;

9. Dio gardas la emmigrintojn, subtenas orfon kaj vidvinon, sed la vojon de malvirtuloj Li pereigas.

10. Dio regxas eterne, via Dio, Ciono, por cxiuj generacioj. Haleluja.

---

PSALMO CL.

1. Haleluja. Gloru Dion en Lia sanktejo, gloru Lin en la firmajxo de Lia forto.

2. Gloru Lin laux Liaj potencaj faroj, gloru Lin laux Lia granda majesto.

3. Gloru Lin per sonoj de trumpeto, gloru Lin per psalterio kaj harpo.

4. Gloru Lin per timpano kaj danco, gloru Lin per kordoj kaj fluto.

5. Gloru Lin per lauxtaj cimbaloj, gloru Lin per bonsonaj cimbaloj.

6. Cxio spiranta gloru Dion. Haleluja.

---

La Sentencoj de Salomono

---

CXAPITRO II

1. Mia filo! se vi akceptos miajn parolojn kaj konservos cxe vi miajn ordonojn,

2. ke via orelo atente auxskultos sagxon kaj vian koron vi inklinigos al komprenado;

3. se vi vokos la prudenton kaj direktos vian vocxon al la sagxo.

4. se vi sercxos gxin kiel argxenton, sercxegos kiel trezoron:

5. tiam vi komprenos la timon antaux Dio kaj vi akiros konadon de Dio.

6. Cxar Dio donas sxagon; el Lia busxo venas scio kaj kompreno.

7. Li havas helpon por la vefemuloj, Li estas sxildo por tiuj, kiuj vivas pie.

8. Li gardas la iradon de la jusxto kaj zorgas pri la vojo de Siaj piuloj.

9. Tiam vi komprenos veremon kaj juston kaj pion kaj cxiun bonan vojon.

10. Cxar sagxo venos en vian koron kaj scio estos agrabla por via animo.

11. Bona konscio vin gvidos, prudento vin gardos,

12. por savi vin de la vojo de malbono, de homo, parolanta kontrauxverajxon,

13. de tiuj, kiuj forlasas la gxustan vojon, por iri la vojojn de mallumo,

14. kiuj gxojas, kiam ili faras malbonon, trovas plezuron en la malordo de la malboneco,

15. kies vojoj estas malrektaj kaj la irado deflankigxis;

16. por savi vin de fremda edzino,--de edzino ne via, kies paroloj estas glataj,

17. kiu forlasas la amikon de sia juneco kaj forlasas la ligon de sia Dio;

18. cxar sxia domo kondukas al morto kaj sxiaj pasxoj al la inferuloj;

19. cxiuj kiuj eniras al sxi, ne revenas, kaj ne reatingas plu la vojon de la vivo.

20. Ke vi iru la vojon de bonuloj kaj sekvu la pasxosignojn de piuloj;

21. cxar la piuloj logxosx sur la tero kaj la senpekuloj restos sur gxi;

22. sed la malpiuloj estos ekstermitaj de sur la tero kaj la maliculoj estos malaperigitaj de tie.

---

CXAPITRO III.

1. Mia filo! ne forgesu mian instruon, kaj via koro konservu miajn ordonojn.

2. Cxar ili akirigos al vi longan vivon, jarojn de vivo kaj paco.

3. Favoro kaj vero vin ne forlasos; alligu ilin al via kolo, skribu ilin sur la tabuletoj de via koro.

4. Kaj vi trovos favoron kaj bonan opinion cxe Dio kaj homoj.

5. Fidu Dion per via tuta koro kaj ne fidu vian prudenton.

6. Konsciu Lin en cxiuj viaj vojoj, kaj Li gxustigos vian iradon.

7. Ne opiniu vin sagxa, timu Dion kaj deturnu vin de malbono.

8. Tio cxi estos saniga por via korpo kaj bona nutro por viaj ostoj.

9. Faru honoron al Dio el via havo kaj el la unuavenajxo de cxiuj viaj rikoltoj:

10. tiam viaj grenejoj tute plenigxos kajx viaj vinpremejoj superbordigos junan vinon.

11. La instruon de Dio, ho mia filo, ne malsxatu, kaj ne deturnu vin, kiam Li faras al vi punon;

12. cxar kiun Dio amas, tiun Li punas, kaj Li favoras lin, kiel patro filon.

13. Felicxa estas la homo, kiu trovis sagxon, kaj la homo, kiu akiris prudenton;

14. cxar estas pli bone gxin acxeti, ol acxeti argxenton, kaj gxia rikoltajxo estas pli bona, ol pura oro.

15. Gxi estas pli kara, ol juveloj, kaj nenio, kion vi povus deziri, povas esti komparata kun gxi.

16. Longa vivo estas en tia dekstra mano, ricxo kaj gloro estas en gxia maldekstra mano.

17. Gxiaj vojoj estas vojoj agrablaj, kaj cxiuj gxiaj vojetoj estas paco.

18. Gxi estas arbo de vivo por tiuj, kiuj gxin ekkaptis, kaj felicxaj estas tiuj, kiuj gxin posedas.

19. Dio per sagxo fondis la teron, per prudento Li arangxis la cxielon.

20. Per Lia cxionsciado disigxis abismoj kaj la nuboj elversxas roson.

21. Mia filo! ili ne foriru de viaj okuloj, konservu klarecon de la kapo kaj prudenton:

22. ili estos vivo por via animo kaj ornamo por via kolo.

23. Tiam vi iros sendangxere vian vojon kaj via piedo ne pusxigxos.

24. Kiam vi kusxigxos dormi, vi ne timos, kaj kiam vi kusxos, via dormo estos agrabla.

25. Vi ne timos subitan teruron, nek pereigon, kiu povus veni de malbonuloj.

26. Cxar Dio estos via helpo kaj gardos vian piedon kontraux reto.

27. Ne rifuzu bonon al la bezonantoj, se via mano havas la forton por fari.

28. Ne diru al via proksimulo: "iru kaj revenu, kaj morgaux mi donos", se vi havas cxe vi.

29. Ne pripensu malbonon kontraux via proksimulo, kiam li kun konfido logxas cxe vi.

30. Ne malpacu kun iu senkauxze, se li ne faris al vi malbonon.

31. Ne penu imiti fabemulon kaj elektu neniun el liaj vojoj;

32. cxar la devojigxantojn Dio abomenas kaj Sian intencon Li malkasxas al la piuloj.

33. Malbeno de Dio estas en la domo de malbonulo, kaj la logxejon de piuloj Li benas.

34. La mokantojn Li mokas, kaj al la humiluloj Li donas favoron.

35. Honoron heredas sagxuloj, sed malsagxulojn forportos malhonoro.

---

CXAPITRO XXIV.

1. Ne sekvu malbonajn homojn kaj ne deziru esti kun ili.

2. Cxar ilia koro pensas pri perfortajxo kaj ilia busxo parolas malbonajxon.

3. Per sagxo koristruigxas domo, kaj per prudento gxi fortikigxas.

4. Kaj per sciado la cxambroj plenigxas per cxia hava grandvalora kaj agrabla.

5. Homo sagxa havas forton, kaj homo prudenta estas potenca.

6. Kun pripenso faru militon, kaj venko venas per multe da konsiligxo.

7. Tro alta estas la sagxo por malsagxulo; cxe la pordego li ne malfermos sian busxon.

8. Kiu intencas fari malbonon, tiun oni nomas maliculo.

9. Malico de malsageco estas peko, kaj blasfemanto estas abomenajxo por homo.

10. Se vi montrigxis malforta en tago de mizero, via forto estas malgranda.

11. Savu tiujn, kiujn oni prenis por mortigi, kaj ne fortirigxu de tiuj, kiuj estas kondamnitaj al morto.

12. Se vi diras, "ni tion ne sciis",--la esploranto de koroj ja komprenas kaj la gardanto de via animo ja scias, kaj Li redonas al homo laux liaj faroj.

13. Mangxu, mia filo, mielon, cxar gxi estas bona, kaj fresxa mielo esxtas dolcxa por via gorgxo;

14. tia estas por via animo la sciado de sagxo, se vi gxin trovis, kaj ekzistas esxtonteco, kaj via espero ne pereos.

15. Ne insidu, malvirtulo, kontraux la domo de virtulo, ne ataku lian ripozejon;

16. cxar sep fojojn virtulo falos kaj tamen levigxos, sed malvirtuloj implikigxas en la malfelicxo.

17. Kiam falas via malamiko, ne gxoju, kaj cxe lia malfelicxo via koro ne plezurigxu;

18. cxar eble Dio vidos, kaj tio ne placxos al Li, kaj Li returnos de li Sian koleron.

19. Ne koleru kontraux malbonfarantoj kaj ne enviu la malvirtulojn.

20. Cxar la malbonulo ne havos estontecon, la lumilo de malvirtuloj estingigxos.

21. Timu, mia filo, Dion kaj la regxon, kun ribeluloj ne komunikigxu.

22. Cxar subite venos ilia pereo, kaj kiu scias, kiam venos la puno de ambaux?

23. Ankaux cxi tio estas vortoj de sagxuloj: konsideri personojn cxe jugxado estas ne bone.

24. Kiu diras al malvirtulo "vi estas virtulo", tiun malbenos popoloj, tiun malamos gentoj.

25. Sed kiuj faras riprocxojn, tiuj placxas, kaj sur ilin venos bona beno.

26. Kiu respondas gxustajn vortojn, tiu kisas per la lipoj.

27. Plenumu vian laboron ekstere, pretigu cxion sur via kampo, kaj poste arangxu vian domon.

28. Ne atestu sen kauxzo kontraux via proksimulo, cxar vi trompus per vla busxo.

29. Ne diru: "Kiel li agis kontraux mi, tiel mi agos kontraux li: mi redonos al la homo laux lia faro."

30. Mi pasis tra kampo de homo maldiligenta kaj tra vinbergxardeno de sensagxulo;

31. kaj jen cxie elkreskis urtiko, cxio estas kovrita de dornoj, kaj la sxtona muro estas detruita.

32. Kaj kiam mi vidis, mi prenis gxin en mian koron, mi rigardis kaj ricevis instruon;

33. Ne longe vi dormos, ne longe vi dormetos, ne longe viaj manoj restos kunmetitaj por kusxado;

34. kaj venos via malricxeco kiel migranto, kaj via senhaveco kiel viro armita.

---

La Predikanto

---

CXAPITRO I

Vortoj de la Predikanto, filo de Davido, regxo en Jeruzalemo. Vantajxo de vantajxoj, diris, la Predikanto, vantajxo de vantajxoj, cxio estas vantajxo. Kian profiton havas la homo de cxiuj siaj laboroj, kiujn li laboras sub la suno? Generacio foriras kaj generacio venas, kaj la tero restas eterne. Levigxas la suno kaj subiras la suno, kaj al sia loko gxi rapidas, kaj tie gxi levigxas. Iras al sudo kaj reiras al nordo, turnigxas, turnigxas en sia irado la vento, kaj al siaj rondoj revenas la vento. Cxiuj riveroj iras al la maro, sed la maro ne plenigxas; al la loko, al kiu la riveroj alfluas, ili alfluas cxiam denove. Cxiuj vortoj estas malfortaj, ne povas homo cxion eldiri; ne satigxas la okulo de vidado kaj ne plenigxas la orelo de auxdado. Kio estis, tio estos, kaj kio estis farata, tio estos farata, kaj ekzistas nenio nova sub la suno. Ekzistas io, pri kio oni diras: "Vidu, tio cxi estas nova"; sed gxi estis jam en la eterna tempo, kiu estis antaux ni. Ne restis memoro pri la antauxuloj; kaj ankaux pri la posteuloj, kiuj estos, ne restos memoro cxe tiuj, kiuj estos poste. Mi, Predlkanto, estis regxo super Izraelo en Jeruzalemo. Kaj mi decidis en mia koro esplori kaj ekzameni per la sagxo cxion, kio farigxas sub la cxielo: tiun cxi malfacilan okupon Dio donis al la homidoj, por ke ili sin turmentu per gxi. Mi vidis cxiujn aferojn, kiuj farigxas sub la suno, kaj jen, cxio estas vantajxo kaj arangxoj ventaj. Kurbigitan oni ne povas rerektigi, kaj mankantan oni ne povas kalkuli. Mi parolis kun mia koro tiele: jen mi kreskigis kaj multigis en mi sciencon pli ol cxiuj, kiuj estis antaux mi en Jeruzalemo, kaj mia koro penetris multon da sagxo kaj scio. Sed kiam mi dedicxis mian koron, por ekkoni la sagxecon kaj ekkoni la malsagxecon kaj sensencecon, mi eksciis, ke ankaux tio cxi estas entrepreno venta. Cxar cxe multe da sagxeco estas multe da koleremeco, kaj, kiu plimultigas siajn sciojn, plimultigas siajn dolorojn.

---

CXAPITRO IV.

Kaj mi returnigxis kaj mi vidis cxiujn premojn, kiuj estas farataj sub la suno: kaj jen estas larmoj de prematoj, kaj ne ekzistas por ili konsolanto; kaj perforteco de la mano de iliaj premantoj, kaj ne ekzistas por li konsolanto. Kaj mi trovis, ke la mortintoj, kiuj jam antaux longe mortis, estas pli felicxaj ol la vivantoj, kiuj vivas gxis nun. Kaj pli felicxa ol ili ambaux estas tiu, kiu gxis nun ne ekzistis, kiu ne vidis la malbonajn farojn, kiuj estas farataj sub la suno. Mi vidis ankaux, ke cxiu laboro kaj cxiu akurateco en la faroj estas nur konkurado de unu kontraux alia, kaj ankaux tio cxi estas vantajxo kaj ventajxo. Malsagxulo kunmetas siajn manojn kaj formangxas sian korpon. Pli bone estas plenmano da trankvilanimeco, ol ambauxmano da penado kaj ventajxo. Kaj denove mi vidis vantajxon sub la suno: jen estas solulo kaj neniun alian li havas, nek filon nek fraton li havas; kaj tamen ne havas finon lia laborado, kaj lia okulo ne povas satigxi de ricxeco; por kiu do mi laboras kaj senigas mian animon de gxuado? Tio cxi ankaux estas vantajxo kaj malbona afero. Pli bone estas al du ol al unu, cxar ili havas bonan rekompencon por sia laborado. Cxar se ili falos, unu levos la alian; sed ve al unu, se li falos, kaj se ne estas alia, kiu lin levus. Ankaux se du kusxigxas, estas al ili varme, sed unu kiel li varmigxos? Kaj se iu montros sin pli forta kontraux unu, tiam ambaux staros kontraux li; ecx fadeno triopigita ne baldaux dissxirigxos. Pli bona estas knabo malricxa sed sagxa, ol regxo maljuna sed malsagxa, kiu jam ne povas akiri scion. Iu el malliberejo eliris kaj farigxis regxo, alia por regxeco naskigxis kajtamen estas malricxa. Mi vidis, ke cxiu vivanto iras sub la suno kun infano: gxi estas la alia, kiu okupos lian lokon. Senfina estas la popolo, kiu estis antaux ili, kaj ankaux la posteuloj ne gxojos pri li; ankaux tio cxi estas vantajxo kaj ventajxo. Gardu vian piedon, kiam vi iros en domon de Dio, kaj estu preta pli por auxskultado, ol por oferdonado de malsagxuloj; cxar ili ne scias, ke ili agas malbone.

---

CXAPITRO V.

Ne rapidu kun via busxorkaj via koro ne rapidu elparoli vorton antaux Dlo, cxar Dio estas en la cxielo, kaj vi estas sur la tero; tial malmultaj estu viaj vortoj. Cxar la songxo prezentigxas per multe da agado, kaj parolo de malsagxulo konsistas el multe da vortoj. Kiam vi faros promeson al Dio, ne prokrastu gxin plenumi, cxar malagrablaj estas malsatuloj; kion vi promesis, tion plenumu. Pli bone estas, ke vl ne faru promeson, ol fari promeson kaj ne plenumi. Ne permesu al via busxo pekigi vian korpon, kaj ne diru al la sendito de Dio, ke gxi estas eraro; kial fari, ke Dio kolerux pro via parolo, kaj ke Li detruu la faron de viaj manoj? Cxe multo da songxoj kaj vantajxoj estas ankaux multe da vortoj; sed vi timu Dion. Se premadon de malricxulo kaj rompadon de justeco kaj honesteco vi vidas en lando, ne miru, cxar pli alta kontrolas pli altan kaj plej altai ilin kontrolas. Kaj superecon en cxio havas tiu lando, en kiu la regxo servas al la tero. Kiu amas argxenton, tiu ne satigxos per argxento, kaj kiu amas ricxecon, al tiu gxi ne donos utilon; ankaux tio cxi estas vantajxo. Ju pli estas da havo, des pli multaj estas gxiaj konsumantoj; kaj kian profiton havas gxia mastro krom vidi gxin per siaj okuloj? Dolcxa estas la dormo de laboranto, cxu li mangxas malmulte aux multe; sed trosateco ne lasas la ricxulon dormi. Turmentan malbonon mi vidis sub la suno: ricxecon konservatan por la malutilo de gxia propra mastro. Kaj pereas tiu cxi ricxeco en malfavoraj cirkonstancoj; naskigxas filo, kaj li nenion havas en la mano. Kiel li eliris el la ventro de sia patrino, tiel nuda li foriras, kiel li venis, kaj nenion li elportas el sia laboro, kion li povus porti en la mano. Kaj tio cxi estas turmenta doloro, ke kiel li venis, tiel li foriras; kian do profiton li havas de tio, ke li laboras por la vento? Kaj cxiujn siajn tagojn li konsumis en mallumo, en multe da ekscitigxo, en malsano kaj malagrablajxoj! Jen, kion mi vidis bonan, ke estas bele mangxi kaj trinki kaj gxui plezurojn de Cxiuj siaj laboroj, kiujn homo laboras sub la suno en la malmultaj tagoj de sia vivo, kiujn donis al li Dio; cxar tio estas lia apartenajxo. Kaj se al iu homo Dio donis ricxecon kaj havon kaj donis al li la povon konsumi ilin kaj preni sian parton kaj gxui plezuron de siaj laboroj,--tio cxi estas dono de Dio. Cxar ne longe li memoros la tagojn de sia vivo, Dio donas al li gxojon de lia koro.

---

## CXAPITRO XII.

Kaj memoru vian Kreinton en la tagoj de via juneco, dum ne venis ankoraux la tagoj de malbono kaj ne venis la jaroj, pri kiuj vi diros: "mi ne havas plezuron de ili"; dum ne mallumigxis la suno, la lumo, la luno kaj la steloj, kaj ne revenis nuboj post la pluvo. Kiam ektremos la gardantoj de la domo kaj malfortigxos la militantoj, kaj cxesos mueli la muelantoj, cxar estos malmulte da ili, kaj senvidigxos la rigardantoj tra la fenestroj; kaj fermitaj estos la pordoj al la strato, kiam eksilentos la sonado de la muelsxtono; kaj homo levigxados laux la krio de birdo, kaj mallauxtigxos la sonoj de kantoj: kaj altajxojn ili ektimos, kaj sur la vojo aperos teruroj, kaj ekfloros la migdalarbo kaj pezigxos la grilo, kaj malaperos deziro: tiam homo foriros en sian eternan domon, kaj sur la strato marsxos plorantoj; gxis dissxirigxos la argxenta cxeneto, rompigxos la ora lampeto, rompigxos la krucxo cxe la fonto kaj falos la rado en la puton. Kaj la polvo refarigxos tero, kiel gxi estis, kaj la spirito reiros al Dio, kiu gxin donis. Vanto de vantajxojx diris la Predikanto, cxio estas vantajxo. Krom tio, ke la Predikanto estis sagxulo, li ankoraux instruis scion al la popolo; li cxion pesis, esploris kaj verkis multe da sentencoj. Penis la Predikanto trovi agrablajn parolojn, kaj li skribis. gxuste vortojn de vero. La paroloj de sagxuloj estas kiel akraj pintoj, kaj kiel enbatitaj najloj estas la vortoj de publikaj parolistoj; ili estas donitaj de unu pasxtisto. Kaj krom tio, mia filo, akceptu mian instruon, ke se oni volus verki multajn librojn, ne estus fino, kaj multe legi lacigas la korpon. Ni auxskultu la finon de cxio: timu Dion kaj plenumu Liajn ordonojn, cxar tio cxi estas cxio por la homo. Cxar cxiun faron Dio venigos al jugxo, ecx cxion kasxitan, cxu gxi estas bona aux malbona.

---

***END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK EL LA BIBLIO***

******* This file should be named 11307.txt or 11307.zip *******

This and all associated files of various formats will be found in: http://www.gutenberg.net/1/1/3/0/11307

Updated editions will replace the previous one--the old editions will be renamed.

EBooks posted since November 2003, with etext numbers OVER #10000, are filed in a different way. The year of a release date is no longer part of the directory path. The path is based on the etext number (which is identical to the filename). The path to the file is made up of single digits corresponding to all but the last digit in the filename. For example an eBook of filename 10234 would be found at:

http://www.gutenberg.net/1/0/2/3/10234

or filename 24689 would be found at: http://www.gutenberg.net/2/4/6/8/24689

An alternative method of locating eBooks: http://www.gutenberg.net/GUTINDEX.ALL

*** END: FULL LICENSE ***

---

*El la Biblio, by Ludwik Lejzer Zamenhof*

A free ebook from http://manybooks.net/